

ESPERANTOLEHTI



Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2012

twitter Search Have an account? Sign in

finnlando

@finnlando

Esperanto-Asocio de Finnlando ry (EAF) kunordigas la agadon de finlandaj esperantistoj kaj celas disdoni informojn pri la internacia lingvo en Finnlando.
Finnlando <http://www.esperanto.fi>

Follow
11 TWEETS
93 FOLLOWING
38 FOLLOWERS

facebook

Sign Up Facebook helps you connect and share with the people in your life.

Esperanto-Asocio de Finnlando

Library · Community Organization · Helsinki, Finland

Wall Esperanto-Asocio de Finnlando · Everyone

Share: Post Photo

Write something...

Esperanto-Asocio de Finnlando via **Harri Laine**
Harri informas: Jorma bele komencas la jaron per artikolo en Turun Sa...
loka societato plentrafte elektis lin honora membro en sia 2-taga festo.

Wall
Info
Photos
Events

About
Suomen Esperantoliitto,
Esperanto-Asocio de Finnlando ry
(EAF) kunordigas l...
More

85

Etusivu Uutiset Tapahtumat

SUOMEN ESPERANTOLIITTO RY

Mitä Esperanto on?
Esperanton opiskelu
Kirjasto
Esperantolehti

en Esperanto

Suomen Esperantoliitto, Esperanto-Asocio de Finnlando ry (EAF) toimii suomalaisen esperanton harrastajien yhdysseitteenä ja pyrkii jakamaan tietoa kansainvälisestä kielellisestä yhteisöstä ja edistämään sen käyttöä. Liiton tarkoituksena on toimia kielellisen tasa-arvon, kaksikielisen yhteisön ja kaksikielisen yhteisön edistämiseksi ja kaksikielisen yhteisön...

Pääsivu Johdanto Kurseja

/ Yhteisö /

Yleiskatsaus / Suomeksi

Sivu 1 (< 1)

Viestiketjuja

- Sanapohdintoja – sauna
- Ajankohtaista
- Tervetuloa uudelle palstalle
- Sivuja: 1, 2
- Kysymyksiä lernuista
- Esperanto-kurseja Suomeksi

Sivu 1 (< 1)

EAF en la Interreto, p. 2, 12, 17

Vintraĵ Tagoj, p. 8 ♦ Ekzameniĝu, p. 4 ♦ Lingva konscio, p. 21

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi

Markus Sunela, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 ✉ markus.sunela@iki.fi

Keith (Keke) Uber, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Sampo 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoimna tiistaisin klo 17-19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malferrmita: marde 17-19-a horo.

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando



Prezidento – sidas antaŭ ni

En la verka momento la ĉefa temo en la Finnlandaj amaskomunikiloj estas balotoj en la 22-a de januaro kaj – eventuale, preskaŭ certe, ankaŭ la 5-a de februaro – por elekti respublikan prezidenton. Finiĝas la 12-jara periodo de Tarja Halonen, la unua virina prezidento en Finnlando. Eĉ se la popolo volus kaj ŝi mem konsentus, trian sesjaran mandaton malebligas la konstitucio.

La Finnlanda konstitucio difinas la prezidenton kiel gvidanton de la eksterlandaj rilatoj kunlabore kun la respublika registaro. En okazo de malakordo, la registaro tamen havas rimedojn trarigati sian starpunkton, se troviĝas sufiĉa, dutriona, parlamenta apogo. Atentinde estas, ke EU-politiko ne estas ekstera – sed ne estas konsento pri tio, ĉu kaj kiom ĝi devus esti. Ĝuste tio estas unu el la disputajtoj en la elektaj kampanjoj.

En la enlanda politiko la prezidento ne havas definitivan decidpovon, krom la rajton nomumi kelkajn altajn oficistojn. Registaron la prezidento nomumas laŭ prezento el la parlamento, sed ne povas tiun preterakcepti nek memstare, proprainciate eksigi la parlamenton kaj ordoni novan baloton. La respublika regado en Finnlando do estas parlamenta-prezidenta, ne prezidenta-parlamentara, kiel ekzemple en Usono, sed ankaŭ ne kiel en ekzemple Germanio, kie la federacia prezidento nenian regopovon havas. La oficiala informejo pri la ŝtata institucio prezidento troviĝas en www.tpk.fi kaj tiu de la respublika registaro en www.vn.fi kaj pri la balotoj kaj kandidatoj en www.vaalit.fi – ankaŭ svede kaj angle.

Estas vaste citata difino pri la rolo de la Finnlanda prezidento ”vojgvidanto pri valoroj” (”arvojohtaja”, ”värdeledare”). Temas pri tio, ke malgraŭ limigita politika rolo, la prezidento des pli gravan rolon havas pro sia morala aŭtoritato. Oni sekvas, kion ŝi/li aprezas aŭ malaprobas. Malfacile estas imagi, ke la prezidento pledus ion ajn kontraŭ la bazaj ideoj pri demokratio kaj homaj rajtoj. Sed: La prezidento venas el la popolo, kiu ne estas unueca, en kiu troviĝas diversaj interpretoj pri la bazaj ideoj komune aprobataj de (preskaŭ) ĉiuj. Efektive, validas ĉi tie la etimologio de la vorto. ”Prezidento” signifas ”personon, kiu sidas antaŭ la aliaj”. Tiu persono neeviteble estas ne nur saĝulo kaj sekvida ekzemplo, sed ankaŭ kiel spegulo, sur kiu videblas kia estas kaj estiĝas la socio. – Nin esperantistojn kompreneble aparte interesas la lingvopolitikaj starpunktoj de la kandidatoj kaj de la elektota prezidento. Tiuj varias. Demokratio kaj egaleco estas certe valoroj rekonataj de ĉiuj, sed kiel tiuj valoroj estas komprenataj en lingva rilato enlanda kaj internacia?

Estas ok kandidatoj en la baloto. Estas rekta elekto, do memkompreneble, ke ĉiuj partioj nomumis sian propran kandidaton sekve havante seĝon en la kampanja publikeco. Tio estas ŝanco propagandi sian programon – kaj, jes, la valorojn sur kiuj la programoj estas bazitaj. Se neniu el la kandidatoj ricevos pli ol duonon de la voĉoj en elekto 22.1., estos dua baloto inter la du plej subtenitaj kandidatoj 5.2. Kiam ĉi tiu numero vin atingos, verŝajne ni jam scias, kiuj du restis.

Estu elektita kiu ajn, la elektito estos laŭ tradicio gratulita de Esperanto-Asocio de Finnlando. Espereble la nova prezidento ankaŭ daŭrigos tradicion resaluti kaj danki al EAF.

Tuomo Grundström

Ni dankas kaj alvokas

Karaj legantoj, membroj kaj amikoj de Esperanto kaj Esperantolehti,

samideano Ilkka Santtila al kutimigis nin al tre bona aspekto-kvalito de nia gazeto tiel longe, ke ni jam pensis tion memkomprenebla kaj ĉiama afero. Des pli ni bedaŭras, ke Ilkka nun estas devigita draste redukti siajn laborojn kaj aktivecojn. Tiu ĉi numero estas lia lasta. Ĝin li bonvolis enpaĝigi malgraŭ malhelpoj; danke al tio, ni sukcesis produkti gazeton, kvankam malfrue. Tiu ĉi numero enhavas ankaŭ la materialojn de normala jarfina numero 6, kiu forfalis.

Esprimante la dankon de EAF kaj la redakta teamo mi alvokas kapablajn agemulojn

aliĝi al la teamo. Atingi la nivelon de Ilkka estas al ni eble tro granda defio, sed kune ni strebos.

Ni serĉas do personon eman kaj kapablan enpaĝigi la gazeton, por kiu ĝis nun estis uzita Adobe InDesign CS3. La arkiva materialo inkluzive de ŝablonoj estos je dispono. Certe la estraro ĝojus ricevi (sin)proponojn ĝis la sekva estrarkunsido je sabato, 11a februaro 2012; kontaktadreso de estraranoj vidu paĝon 2.

*Tuomo Grundström,
respondeca redaktoro,
prezidanto de EAF*

Ĉu ekzameniĝi?

Ĝuste ĉijare indas konstati la nivelon de sia lingvoscio kaj fari tion facile en nia hejmlando sen pli longa vojaĝo ol al Helsinko.

UEA/ILEI aranĝas **Tutmondan Skriban Ekzamensesion** la 9an de junio.

Imagu, ĉie en la mondo eble centoj da homoj ekzameniĝos samtage! La parolan parton oni povas, se oni volas, fari dum UK aŭ iu alia aranĝo. Por la skriba ekzamensio estas postulata, ke minimume kvin personoj partoprenos.

La niveloj estas baza B1, meza B2, supera C1 laŭ KER (Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj).

Daŭro kaj prezoj de la ekzamenoj estas: B1 2 h/34 €, B2 3h/37 € kaj C1 4h/42 €.

La ekzamena rezulto estas pritaksata laŭ la sekvaj kriterioj:

En la skriba parto

- ♦ lingva korekteco;

En la skriba sinesprimado

- ♦ verkado laŭ la komunika celo kaj ĝenraj postuloj de la tasko (ekz. letero);
- ♦ enhava riĉeco;
- ♦ enhava kaj lingva kohereco;
- ♦ leksika riĉeco kaj taŭgeco;
- ♦ lingva korekteco;
- ♦ globala kaj detala kompreno de legita teksto

La ekzamena loko kaj horo estos sciigitaj poste.

Por aliĝi iru al <http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>. Pri la pago marku "Mi pagos surloke antaŭ la ekzameno". Ni lokaj aranĝantoj kolektos la monon post kiam ni scios ĉu la sesio realiĝos.

Pli detalajn sciojn kaj konsilojn la aliĝintoj ricevos poste.

Demandojn vi povas sendi al sylvia.h@kolumbus.fi

Sylvia Hämäläinen

La Finno Eino Leino inspiris la polan poetinon Halina Weinstein trafe traduki

Septembre 2008 en Varsovio ĉe la Zamenhofa strato enmanigis Zofia Banet-Fornalowa al mian verkon "La pereintoj in memoriam". Temas pri esearo de eminentaj polaj esperantistoj, kiuj perdis sian vivon dum la Holokaŭsto. La aŭtorino prezentas sesopon de internacie rekonataj talentuloj. Mian apartan atenton kaptis Halina Weinstein (1902–1942), kies meritojn oni konas sur la kampoj literatura kaj instrua. En la 1920-aj jaroj ŝi montris fervoran aktivecon inter la membroj de la Pola Studenta Esperanto Societo, kies sidejo situis en la kvartalo Muranów ĉe la strato Leszno 99 sur la pli posta malbonfama tereno de la Juda Geto. Post la Cseh-kurso en Budapeŝto en la jaro 1929 malfermiĝis al ŝi vasta pedagogia kariero kun instrua itinero 1930 ankaŭ al Estonio kaj Finnlando. Kiel membro de la Loka Kongresa Komitato en Varsovio 1937 Halina Weinstein donis plenan subtenon

por la organiza laboro.

Abunda kaj tre riĉa estis ŝia literatura verkado. Estas interese scii, ke ŝi en la 1930-aj jaroj tradukis du poemojn de Eino Leino: "Kanto pri feliĉo" (Laulu onnesta) kaj "Aŭtuna agordo" (Syystunnelma).

Ili aperis sur la paĝoj de Pola Esperantisto en 1932 kaj 1934. D-ro Lauri Ilmari Lappi, kuracisto en la Outokumpu-minejo, korespondis kun Halina Weinstein, kiu dediĉis sian tradukaĵon *Kanto pri feliĉo* al la finna korespondamiko. La Franca lingvisto Gaston Waringhien kaj la hungara poeto K. Kalocsay rekonis ŝiajn talentajn verkaĵojn poeziajn.

Estas inde mem per propraj okuloj kaj oreloj ĝui, kiel bele, elaste kaj flue funkcias Esperanto per la plumo de Halina Weinstein. Ĉi-sube trafa ekzemplo.

Jorma Ahomäki 3.11.2011

Syystunnelma

*Teit oikein ystävä ainoo,
Kun luotani läksit pois:
Sun rintasi nuori ja lämmin
Mun rinnalla jäätynyt ois.
Kas maantiellä kalpea kukka
Lumipälvestä nostavi pään.
Mitä vuottelet kukkani vielä, –
On aika jo painua pään.
Tuhat aatosta sieluni tunsi,
Sen vaan minä muistaa voin.
Oli tielläni kuihtunut kukka
Ja sen peitoksi lunta mä loin.*

*Eino Leino "Kehräjälintu" 1897
(Kaprimgo), Melodio Toivo Kuula*

Aŭtuna agordo

*Ĝuste faris vi solamikino,
Ke vi fine foriris de mi:
Via koro la juna kaj varma
Ĉe la mia fariĝus glaci'.
Sur la vojo jen pala floreto
Kronon levas en mezo de l' neĝ'.
Plu nenion atendu, flor' mia –
Temp' por velki natura la leĝ'.
En animo ekestis mil pensoj,
Unu restis en mia memor'.
Sur la vojo velkintan floreton
Per neĝ' kovris kaj iris mi for.*

Trad. Halina Weinstein 1934

*Post kiam la franca tandemisto **Johano-Jakobo Moro (Jean-Jacques Moreau, vidu EF 4-5/2010 p. 13)** revenis, li menciis tiun surprizan renkonton en Helsinko ankaŭ en sia vojaĝraporto, aperinta en la bulteno de la grupo en Tours (Saliko gastigiĝis tie, tekstoj aperas en la sama EF).*

Jen la parto de tiu raporto, kiu rilatas al Finnlando, kaj kiu aperis en "Luko 23" (<http://eomikelo.free.fr/lukoj/luko23.pdf>):

Periplo tra la baltaj landoj

(sekvo)

Post la foriro el Sankta-Peterburgo kaj post cent sep kilometroj, ni tranoktas en la lasta urbo de Rusio. Ĝi nomiĝas Vyborg. En la ĉambro ni gastigas rusan paron, pli precize, ili enkra-kistas nian dormĉambbron, la hotelestro sciante nenion. En la tapiŝo, larvoj de vekigontaj puloj kuŝas. La rusoj dormas sur ŝveligebla lito; kiam la edzo moviĝas, la lito bruegas – ĉefe kiam la vekigintaj puloj pikas. Post memorebla nokto la korpo de la edzo estas plenkovrita de haŭtvezikoj. Dum pluraj tagoj li skrapos sian haŭton.

Vyborg estas urbo malĝoja, kiu suferis tro ofte pro militoj, pro proksimiĝo al Finnlando, multnombraj domoj ruiniĝas. Kial? Kie loĝas la posedantoj, ĉu ili ankoraŭ vivas... restas por mi multnombraj demandoj sen respondo. Kia fekaĵo, la milito!

Baldaŭ Finnlando aperas. Post landlimo kaj post longaj ĉikanoj de doganistoj ni trapasas la landlimon. Tuj post rusaj vastegaj senkulturejoj, subite kia miraklo estas tiu zorgita kamparo. Ĉu la tiea grundo pli fruktodonas ol rusa grundo? La respondo aperas sur la vizaĝoj de loĝantoj el la du landoj. La tieaj kulturistoj rikoltas tritikon pleningante remorkojn, ktp.


Antaŭ memserva magazeno, budo kiu entenas ĉarmajn vendistinojn allogas nin. En ĝi oni aĉetas (mi devus skribi "aĉetadas") salmajon freŝe fumajitan, kiu regalas nin, ni neniam manĝis tian bongustaĵon. Fine ni aprezas bonan vivmomenton.

Ni tendumas en Lappeenranta, ĉarma plezurhaveno. Ni vespermanĝas sur teraso ĉe kanalo. La etoso, la vetero, la vivmaniero de gapantoj estas preskaŭ samaj kiel en Francio. Denove ni trovas la vojaĝon kaj la vivon belaj, rapide ni forgesas la malbonajn momentojn.

Post kvar tagoj ni alvenas al Helsinko. La restado okazas en la junulara gastejo. En ĝi, matene, mi ekvidas Esperantiston vestitan per vestaĵo rekonebla pro esperanta frazo. Li estas akompananta sian edzinon. "Kia ĝojo" por mi. Mi, kiu de ĉiam atendis tian momenton! Mi alpaŝas ilin kaj ekbabilas kun ili, ŝajne, kiel mi, ili surpriziĝas kaj ege feliĉas. Mi fieras prezenti ilin al miaj amikoj, kiuj de longtempe mokas min pri nia karega lingvo. Ekde nun mi estos pli kredinda ol antaŭe. Mi notas ilian adreson sur mia jarlibro ĉar mi intencas korespondi kun ili, kiam mi estos reveninta hejmen.

Post tiu porĉiama neforgesebla momento, ni vizitas la urbon. La katedralo faras la famon de la urbo, tiel ĝi estas fotata. De la supro de Sena-





teja Placo, la katedralo superas la urbon. La pureco de blanka ŝtono diferencigas ĝin el la aliaj monumentoj, kvankam ĝia volumeno sufiĉas. La konstruo daŭris dudek du jarojn. Ĝia stilo estas novklasika. Ĝi staras vidalvide al la nacia biblioteko kaj al la Palaco de Registaro.

La mara fortreso Suomenlinna estas konstruita de registaro el Svedio por protekti sin kontraŭ la Rusa Imperio. Ni vizitas la tunelojn, la subteraĵojn, vidas kanonojn dise kuŝitajn, ni eniras eĉ en etan submarŝipon. Revenintaj de la mara fortreso, ni vizitas la kirkon Temppe- liaŭkio, kurioza preĝejo en la roko, la muroj ne estas masonitaj sed tajlitaj en la roko mem. La plafono konsistas el kupraj filamentoj formante kupolon videblan nur ekstere. Interne la akustiko bonsonoras.

Por festi la finon de la irvojaĝo, ni manĝas kune. Nur unu restoracio akceptas nin, estas ĉina restoracio. La laboristoj ĉinaj kapablas adapti sin al la peto (ankaŭ imitenda konduto), tial oni ne aŭdas ilin plendi. Post la vizitado, ni enŝipiĝas por trapasi la Baltan Maron. Ni elŝipiĝas en Germanio, denove ni retrovas la plezuron premi la pedalajn.

Ni vizitas la urbon Treviro, la romanajn ruinojn, la Porta-Nigra-n (ne necesas traduki tiun lastan vorton). La Romianoj konstruis tiun pordon dum la unua jarcento. Ni malkovras malnovajn stratojn, domojn, kun trabarmuroj zorge skulptitaj kaj farbitaj. Ni laŭiras la mozelan valon, unu el la plej belaj regionoj, kiun ni vidis dum nia tuta vivo. La traŭboplena vito kreskas ĉie, riĉigante la vinkulturistojn. Kelkfoje pro kruta klifo por atingi la vinberejon oni devas iri ŝipe. Ĉie, ĉio bonodoras, la ĉirkaŭfarmbieno mont-ras neniun malnovan ilon dise, tie la disciplino regas ĉie. Ni profitas la okazon por gustumi kaj trouzi la blankan trinkaĵon. Kia plezuro!

Trapasante Luksemburgion ni ne ŝparas nian ŝparmonon, la monuoj estante malplenaj (preskaŭ).

La trapaso de Francio okazas bone, la ĉevaloj de nia rajdobesto flarante la stalon. Dum la lasta etapo ni biciklos cent sesdek ses kilometrojn. La kalkulilo indikas proksimume ses mil kilometrojn. Krom la postaĵo, ĉio fartas kaj sanas bonege.

*Johano-Jakobo MORO
(Jean-Jacques Moreau)*

Vintraj Tagoj – Talvipäivät

10.–11.3.2012

Kunvenejo/paikka: Hotelo Seurahuone en Riihimäki; adreso/osoite: Hämeenkatu 29

Temo: Edukado kaj instruado en formo de metiejoj / Aihe: Opetusta ja valistusta, työpajat odottavat

La programo de Vintraj Tagoj en Riihimäki enhavos multajn aktivaĵojn sub la temo Edukado kaj Instruado. Vi aŭdos pri la pasintaj jardekoj, kiam Sylvia Hämäläinen rakontos pri la historio de ELFI. Kaj ni havos eksterlandan preleganton kvazaŭ ŝi ĉeestus: per la moderna tekniko eblas aŭskulti la spertulon Katalin Kovats preskaŭ kiel ŝi estus surloke. Ŝi prelegos pri RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net), en kiu i.a. Paula Niinikorpi studas. Paula kontribuos rakontante pri propraj spertoj.

Nia celo estas ĉi-foje montri eblecojn studi en la reto. Vi ĉiuj povos partopreni mem kaj konatiĝi praktike en la mirindaj eblecoj lerni la internacian lingvon. Do, se vi ne ankoraŭ vizitis aŭ eĉ ne vidis kio estas *lernu* aŭ *edukado.net*, nun vi havus eblecon. Prenu vian propran komputilon aŭ uzu tiujn kiujn ni kunportos.

En labormetiejoj ni filmŝatantoj kune faros proprajn filmetojn. Keke gvidos la grupojn kaj dum la vespero ni vidos la rezultojn. Vespere ni vizitos la plej ekzotikan retejon: la virtualan mondon, kiu nomiĝas Dua Vivo. Anna Löwenstein promesis esti nia gvidanto tie, kompreneble en sia avataro-formo.

Antaŭ la vespermanĝo estas aranĝita, jam tradicie, akcepto por membroj de la Societo Nino Runeberg – membriĝu ankaŭ vi al la subtena societo de EAF.

Dimanĉe post la matenpreĝo estos la jarkunveno de la Asocio. Tie ni rigardos la pasintan jaron, decidis pri la estontaj aferoj kaj elektos

la funkciulojn. Tre gravas ke plej eble multaj ĉeestos. Ankaŭ vi aŭdos pri la projekto Esperanto 125 de UEA.

Post la kunveno ni turismas al unu de la famaj muzeoj de Finnlando: *Riihimäen lasimuseo*, kiu rakontas pri ĉio ebla koncerne la faradon de vitraĵoj. En la muzea kafejo ni tagmanĝos kaj kafumos. Transporto estas organizita tien kaj reen.

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson *eafmendoj@esperanto.fi*. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj scios, kiu volas kion dum la VT.

Kun eventualaj demandoj vi povas turni vin al estraranoj de EAF. Al VT-aranĝoj kiel programo, tranoktoj, manĝoj, vojaĝeblecoj ktp. respondas Paula Niinikorpi kaj Tiina Oittinen, kaj al komputilaj aferoj (filmoj, retejoj ktp.) Keke Uber kaj Robert Bogenschneider. Koncerne jarkunvenajn demandojn estas je via dispono Tuomo Grundström. Päivi Saarinen kune kun Tiina Kosunen prizorgas pri la aliĝiloj kaj pagoj. Kontaktinformojn de ĉiuj sur paĝo 2.

Bonvenon!



Talvipäivien ohjelmassa on paljon asiaa esperanton kielen ja kulttuurin opetuksesta ja opiskelusta. Kuulemme Suomen opettajien esperantoyhdistyksen vaiheista 90 vuoden ajalta. Niistä kertoo ELFI:n historiikin laatija ja nykyinen puheenjohtaja Sylvia Hämäläinen. Tutustumme myös uusiin netin mahdollistamiin opiskelume-

netelmiin ja kaikki saavat neuvoja miten aloittaa opiskelu esimerkiksi *lernu.net*issä.

Tällä kertaa saamme tietotekniikan avulla ulkomaisen luennoitsijan: Katalin Kovats kertoo meille netin välityksellä opettajien valmennusohjelmasta nimeltä RITE sekä opettajien ja opiskelijoiden nettisivustosta *edukado.net*istä. Paula Niinikorpunen kertoo osallistuu RITE-valmennukseen ja kertoo meille kokemuksistaan.

Ryhmätyönä tehdään videoklippejä. Keke Uber ohjaa ryhmiä ja valmiit työt näemme illalla. Ota mukaan oma kannettava tietokoneesi, jos mahdollista. Iltaohjelmassa meillä on netin kautta toinen vieras: Anna Löwenstein on luvannut esitellä meille avatar-hahmossaan Dua Vivon virtuaalimaailmaa. Mahdammeko tunnistaa hänet helposti?

Talvipäivien perinteiset ohjelmat ovat vuosikokous tärkeine päätöksineen, Nino Runeberg-seuran vastaanotto, jäsenjärjestöjen kokoukset ja museokäynti. Liiton hallitus kertoo myös Esperanton maailmanliiton juhlaprojektista Esperanto 125.

Museokäynti sunnuntaina suuntautuu Riihimäen lasimuseoon, jossa on opastettu kierros. Lounaan kahveineen nautimme museon kahvila-ravintolassa. Kuljetus museolle ja sieltä takaisin Riihimäen aseman seudulle sisältyy talvipäivien pakettiin.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi. Maksa osallistumis- ja pakettimaksu ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet. Ilmoittautumisista ja maksuista huolehtii Päivi Saarinen yhdessä rahastonhoitaja Tiina Kosusen kanssa.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 10.–11.3.2012 en Riihimäki.

Nomo

Adreso

Tel./Fakso/Ret-adreso

Aliĝkotizo

___ 15 e ĝis 31.1.2012

___ 19 e ĝis 29.2.2012

___ 22 e poste

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-paketo

___ 50 e/persono

(inkl. kafon kaj vespermanĝon sabate, lunĉon kun kafo dimanĉe kaj muzean viziton kun transportoj)

VT-hotelpaketo en hotelo Seurahuone Riihimäki

___ 40 e/persono en 2-lita ĉambro

___ 69 e/persono en 1-lita ĉambro

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH.

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn, kiam vi ĝiras la monon).

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi
BONVENON!

Venontaj

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville
10.–11.3.2012 Riihimäellä.

Nimi

Osoite

Puh./fax/sähköposti

Ilmoittautumismaksu:

- ___ 15 e 31.1.2012 asti
___ 19 e 29.2.2012 asti
___ 22 e 29.2.2012 jälkeen

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäivien paketti

___ 50 e/hlö

(sis. kahvit ja päivällisen lauant., lounaan kahveineen sunn. sekä museokäynnin kuljetuksineen)

Talvipäivien hotellipaketti, hotelli Seurahuone Riihimäki

- ___ 40 e/hlö 2-hengen huoneessa
___ 69 e/hlö 1-hengen huoneessa

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille

Tilinumero: Sampo FI11 8000 1700 2308 25.

Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi
TERVETULOA!

Talvipäiviä koskeviin kysymyksiin vastaavat liiton toimihenkilöt seuraavasti: Hotellivaraukset, ruokailut ja matkustusmahdollisuudet: Paula Niinikorpi ja Tiina Oittinen. Tietotekniikka, filmityoöpajat, tietokoneen käyttö: Keke Uber ja Robert Bogenschneider. Vuosikokous, omien kokousten tilavaraukset: Tuomo Grundström ja Tiina Oittinen. Maksuasiat: Päivi Saarinen ja Tiina Kosunen. Kaikkien yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.

Tervetuloa!

Programo – Ohjelma

Sabato / Lauantai, 10.3.2012

- 11.00 Esperanto en nuksoŝelo: Enkonduka leciono de Esperanto. Esperanto pähkinänkuoressa: Tutustu esperantoon!
- 12.00 Malfermo de akceptejoj kaj libroservo en hotelo Seurahuone. Vastaanotto aukeaa hotelli Seurahuoneen aulassa. Kirjamyynti "libroservo" kokoustiloissa.
- 13.00 Bonvenigaj vortoj kaj malfermo de la tagoj. Tervetulosanat ja päivien avaus. Enkonduko al Projekto 125 (estraro de EAF). – Johdatus 125-juhlavuoteen (esperanto julkaistiin v. 1887).
- 13.20 ELFI sin prezentas, historio (Sylvia Hämmäläinen) kaj novaj aferoj, speciale en reto, komenco de metiejoj, gvidas Keke Uber, Paula Niinikorpi, Robert Bogenschneider. ELFI (Suomen opettajien esperantoyhdistys) esittäytyy ja kertoo 90-vuotisesta historiastaan (Sylvia Hämmäläinen). Lisäksi kerrotaan uusista nettiopiskelumahdollisuuksista ja aloitetaan työpajat, ohjaajina Keke Uber, Paula Niinikorpi, Robert Bogenschneider.
- 14.30 Prelego de Katalin Kovátsin virtuale, temo RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net). Paula Niinikorpi rakontas pri siaj propraj spertoj kun RITE. Katalin Kovátsin virtuaaliluento aiheena opettajien valmennusohjelma RITE. Paula

Niinikorpi kertoo omista opiskelukokemuksistaan.

- 15.30 Metiejoj por fari artemaj videofilmetoj komputile kaj konatiĝo al lernu!, edukado. net ktp. Työpajoja tietokoneiden ääressä: Filmityöpajat joissa tehdään ryhmissä videoklippejä, tutustuminen opiskeluyhteisö lernuun, edukado.nettiin ym.
- 16.30 Kafo. Kahvi.
- 17.00 Kunvenoj de membroasocioj de EAF laŭ alvokoj. Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia.
- 19.10 Akcepto de Societo Nino Runeberg (nur por membroj). Vastaanotto Nino Runeberg -seuran jäsenille.
- 19.30 Vespermanĝo. Illallinen.
- 20.30 Vespera programo. Prezento de filmetoj faritaj en metiejoj. Vizito al Dua Vivo kun Anna Löwenstein. Iltaohjelma, näemme tehdyt videoklipit ja käymme Dua Vivon virtuaalisessa maailmassa, oppaana Anna Löwenstein.
- 22.00 Libera kunestado. Vapaata yhdessäoloa. Bonan nokton! Hyvää yötä!

Dimanĉo / Sunnuntai, 11.3.2012

- 9.00 Matenpreĝo de KELF. Aamuhartaus, järjestää Suomen kristillinen esperantoyhdistys.
- 9.30 Kontrolo de rajtigiloj. Valtakirjojen tarkastus.
- 10.00 Jarkunveno de EAF. Suomen Esperantoliiton vuosikokous.
- 12.00 Ekiro per propra buso al la muzeo Riihimäen lasimuseo kaj vizito tie. Lähtö yhteisellä bussilla Riihimäen lasimuseolle ja tutustuminen museoon. Adreso/osoite: Tehtaankatu 23
- 13.30 Lunĉo kaj kafo en la kafejo de Lasimuseo. Lounas ja kahvit Lasimuseon kahvilassa. Fermaj vortoj de la tagoj. Transporto reen. Päivien päätössanat. Kuljetus takaisin.

Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉon, la 11an de marto 2012 je la 10a horo en Riihimäki, en la kunvenejo de hotelo Seurahuone Riihimäki, Hämeenkatu 29. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 11.3.2012 klo 10.00 alkaen Riihimäellä, hotelli Seurahuone Riihimäen kokoustiloissa, Hämeenkatu 29. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stadgeenliga årsmöte söndagen den 11.3.2012 kl. 10.00 i Riihimäki i hotell Seurahuone Riihimäkis mötesutrymmen, Hämeenkatu 29. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

La estraro – Hallitus – Styrelsen

Kunvoko al la jarkunsido

Laŭstatuta jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj okazos sabaton la 10an de marto 2012 je la 17a en Hotelo Seurahuone en Riihimäki.

Estas traktotaj laŭstatutaj jarkunsidaj aferoj. Ĉiuj estas bonvenaj!

La estraro



Novaj retpaĝoj de EAF

Esperanto-Asocio de Finnlando EAF ekde januaro havas novajn hejmpaĝojn kaj esperas ke vi jam multnombre vizitis ilin. La novaj paĝoj nun estas:

- ◆ pli klaraj
- ◆ pli simplaj
- ◆ pli modernaj
- ◆ pli facile ĝisdatigeblaj (de la estraranoj)

Ili enhavas jenajn kategoriojn:

- ◆ eventojn
- ◆ novaĵojn
- ◆ mapon al la oficejo
- ◆ konekton al vizaĝlibro (facebook) kaj tvitero (twitter)
- ◆ vendejon (nun vi trovas tie la retadreson kien sendi la mendojn, pli poste estos pli aŭtomata)

La adreso daŭre estas www.esperanto.fi (ne ĉion bonan indas ŝanĝi). Bonvenon viziti!



Suomen Esperantoliitolla on uudet kotisivut, jotka otettiin käyttöön tammikuussa. Toivotavasti monet ovat jo vierailleet niillä. Hyvää osoitetta www.esperanto.fi emme tietenkään vaihtaneet. Uudet sivut ovat selkeämmät, yksinkertaisemmat ja helposti päivitettävät (päivitysoikeudet on liiton hallituksen jäsenillä). Sivuilla on osioina mm. tapahtumat sekä uutiset ja niiden kautta löytyy toimiston osoite sekä linkki liiton facebook- ja twitter-sivuille. Tervetuloa klikkailemaan!

UEA kun pli da membroj ol lastjare kaj 2500 amikoj en Facebook

UEA notis du gravajn ciferojn la 16-an de novembro: la nombro de individuaj membroj superis la pasintjaran nombron kaj la nombro de la ŝatantoj de la paĝo de UEA en Facebook

atingis 2500.

En 2010 la definitiva nombro de individuaj membroj de UEA estis 5288. La 16-an de novembro la ĉi-jara nombro jam estis 5292. Ĉar malfruaj kotizpagoj daŭre enfluas, la nombro plu kreskos kaj superos 5300 en la oficiala statistiko, kiu inkluzivos la pagojn registritajn plej laste meze de marto 2012 kaj aperos en la aprila numero de "Esperanto".

Depende de la kotizkategorio, ankaŭ tiuj, kiuj malfrue pagos la ĉi-jaran kotizon, ricevos, krom la Jarlibro aŭ Gvidlibro 2011, ankaŭ ĉiujn ĉi-jarajn numerojn de la revuo "Esperanto" kaj de la revuo "Kontakto" de TEJO.

La paĝo de UEA en Facebook estis kreita en novembro 2009. Du jarojn poste ĝi ricevis sian 2500-an "ŝatanton". Ĉirkaŭ 1500 ŝatantoj vizitas la paĝon minimume unufoje monate. Plej multe da ŝatantoj estas en Usono (282), Brazilo (213), Francio (155), Hispanio (122), Italio (119), Pollando (117), Germanio (98), Meksiko (82), Argentino (75) kaj Rusio (61). El tiuj, kies sekso estas konata, 27,4% estas virinoj kaj 72,6% viroj. Laŭ la aĝo la ŝatantoj distribuiĝas jene: ĝis 17-jaraj 2,5%, 18-24-jaraj 14,2%, 25-34-jaraj 22,4%, 35-44-jaraj 17,2%, 45-54-jaraj 18,9%, minimume 55-jaraj 19,8% (5% ne anoncas aĝon).

[GK 432]

Stipendio pri terminologio

Subtene al siaj junaj membroj, Universala Esperanto-Asocio (UEA) ofertas al du studentoj la eblon partopreni la Someran Terminologian Trejnadon en Vieno, Aŭstrio.

Temas pri neesperantista aranĝo por lerni pri terminologio. Ĝi daŭros de la 8-a ĝis la 14-a de julio 2012. Instruos (en la angla) mondfamaj profesoroj pri terminologio kaj faka komunikado.

Partoprenantoj de la trejnado povas ricevi 6 universitatajn poentojn (tiel nomitaj "ECTS-poentoj") rekompence al la unusemajna trejna-

do.

Post la trejnado eblas fari ekzamenon kaj, kaze de sukceso, ricevi oficialan atestilon de “Terminologia Manaĝero”, kiu estas agnoskita en 18 EU-landoj. Se vi interesiĝas, bonvolu peti pli da informoj.

UEA pagos la kotizojn por la aranĝo, vojaĝ-kostojn, la restadon kaj unusemajnan bileton por amasveturiloj en Vieno. Limdato por kandidatiĝoj estas la 8-a de aprilo 2012.

Detalojn oni legu en sekva PDF-dosiero: <http://esperanto.net/tec/somera-terminologia-trejnado-2012.pdf>

Se vi konas junulojn, kiuj interesiĝas pri tiu sanco, nepre kuraĝigu ilin por kandidatiĝi!

Se vi mem estas junulo, ne hezitu peti pli da informoj kaj... kandidatiĝi!

Mélanie Maradan

retadreso: melmaradan@yahoo.fr

(UEA-komisiito pri terminologiaj instancoj)

[laŭ Eventoj]

La gratuloj de Pola Retradio en Esperanto – Jorma Ahomäki dankas

Vendrede la 4-an de novembro 2011 Pola Retradio per varmkoraj vortoj gratulis 80-jaran vicrevizoron en Turku. Sinceran dankon mi sendas al Varsovio. Multaj foraj kaj proksimaj gesamideanoj memoris la festotagon (03.11.). Kompreneble miaj okuloj brilas. Jam en 1959 mi sekvis elsendojn el la naskiĝurbo de la Zamenhofa lingvo. La nuna loka societo en Turku ekfunkciis 1961. La 15-an de decembro 2011 ni kolektiĝis sur la bordoj de la rivero Aura por retrorigardi la pasintajn tagojn, kiujn ni konservas en nia memoro. Trafaj kaj konvenaj vortoj mankas al mi, sed feliĉon mi sentas pro la ”nova sento”, kiu hodiaŭ daŭrigas sian vojon kaj ”flugas de loko al loko” en ĉiuj mondpartoj.

Dankeme – Jorma Ahomäki

Por kompreni kiel koloroj kongruas

Aperis nova ilo por instrui lingvon kaj scion pri koloroj. La hejmpaĝon esperantigis Kerstin Rohdin el Svedio (kontrollegis Saliko). Temas pri multkolora kartona puzlo pilkoforma, kiun oni povas kunmeti kaj malkunigi kaj denove pilkigi. Ĝi montras la ŝanĝiĝon de koloroj, de unu al aliaj, iliajn helecon, saturitecon kaj nuancojn.

La puzlo estas lernilo pri kolorvortoj (provu inventi tiajn vortojn!) kaj pri la kombinado de koloroj. Ĝi utilas al artstudentoj, klientoj de eldonejoj, reklamdesegnistoj, ĝi amuzas infanojn

Nicoline Kinch, la premiita inventintino.



kaj samtempe ĝi estas ornamaĵo.

www.facebook.com/Kolormondo

<http://www.kolormondo.com>

Saliko

Malfermaj pordoj en la oficejo je 17.12.



Foto: RB

Por la ĉijara Zamenhoffesto elektigis renkonto dum sabato, la 17an de decembro en la ĉefurba EAF-oficejo. Rekorda kvanto de pli ol dudek partoprenintoj plenigis ĉiun lokon en la kunvenejo kaj apuda kuirejo, por babilu gajetose ĉe tradicia jultempa gloĝo (spicita varma trinkaĵo glögi, kun migdaloj kaj rozinoj) kaj spickeksoj.

EAF-sekretario Tiina Oittinen prizorgis eblecon saluti la rondon pere de Skajpo, same pere de Vizaĝlibro, telefono kaj retpoŝto venis salutoj.

Unu temo dum la komuna babilado estis partopreno en la internacia skriba KER-ekzameno de UEA/ILEI, kiu okazos samtempe en multaj lokoj dise tra la tuta mondo je la 9a de junio en Helsinko.

La minimumo de 5 kandidatoj troviĝis, do kaptu la okazon.

RB, laŭ blogo de EKH kaj <landa-agado>

Eventokalendaro de EAF

2012

- 10.–11.3. Vintraj Tagoj de EAF en Riihimäki
- 8.–9.6. Antaŭekskurso de kursosemajno (Naantali, Turku)
- 9.6. KER-ekzameno en Helsinko (ELFI)
- 10.–15.6. Esperantokurso en Popola instituto de Valamo
- 28.7.–4.8. UK en Hanojo, Vjetnamio

Esperanto-societo en Turku (EST) festis sian 50-an datrevenon

La kluba prezidantino Tiina Oittinen bonvenigis kvardek gesamideanojn por festi la 50-an datrevenon de la Esperanto-societo Turku (EST) en la naskiĝotago de d-ro Zamenhof je 15.12.2011. En la fonda kunveno 1961 partoprenis kvindek personoj. Muzika kaj teatra grupeto de Anna-Liisa Ali-Simola prezentis kantojn kaj teatraĵeton. En la nomo de EAF parolis Tuomo Grundström. Gratulmesaĝojn legis Jukka Nikoskelainen kaj Leena Tiusanen. Bondeziroj kaj salutoj alvenis el Japanio, Svedio, Danio, Pollando kaj Finnlando.

Lumofolioj jetis fragmentan rigardon al pasintaj tagoj sur la vivovojo de la jubileanta

societo. Oni enmanigis honoran diplomon al Jorma Ahomäki, kiu dankis pro la omaĝo. Harri Laine transdonis la saluton de Katalin Kováts, kiu informis pri dek novaj premiitaj membroj en la Panteono lige kun *edukado.net*. Inter ili estas la turkuano Jorma Ahomäki, kiu preskaŭ tuj ricevis en la reto naŭ kuraĝigajn komentojn. Pliaj detaloj pri la temo estas legeblaj ĉe *www.edukado.net*.

Loka svedlingva gazeto Åbo Underrättelser skribis 15.12. pri la societa festo sur la dua pago sub la titolo *Hallå där*.

Jorma Ahomäki



Ekspozicio de Zamenhof-tago en la urba biblioteko en Hyvinkää. Raita Pyhälä (Saliko) aranĝis kaj Sirkka Mattlin fotis.

Solstica festo en pluva Helsinki

Fejo organizis la tradician Solstican feston dum la semajnfino 17a-18a de decembro 2011. Okazis denove agrabla renkontiĝo kun varia programo.

Sabate post la malfermaj pordoj en la oficejo de EAF ni daŭrigis la programon per komuna manĝo en proksima restoracio. Bone manĝinte ni direktis nin al Sibelius-akademio por aŭskulti koncerton de studentoj. NYKY Ensemble bone ludis siajn instrumentojn kaj kolektis niajn aplaŭdojn. Vere spertinde.

Pro malagrabra pluvo dimanĉe ni preferis viziti la subtegmentan julbazaron en Ratikka-museo (muzeo pri tramoj). Tie ni povis admiri

kaj laŭdezire aĉeti bele faritajn manlaboraĵojn de diversaj metiistoj. Samfoje eblis viziti ankaŭ la muzeon. Fakte, mi trovis la muzeon simpatia: tie eblis eĉ eniri iujn malnovajn tramvagonojn kaj nostalgiumi, kiel ĉio estis ekzemple antaŭ cent jaroj. Ankaŭ filmoj kaj grandaj anonctabuloj bone lumigis la historion de tramoj en Helsinki. Jam la situo de la muzeo tre kongruas kun la temo, ĉar la muzeo ja estas en la eksa vagonhalo de tiama tramkompanio. Finfine estis tempo por denova komuna manĝo en la proksima ĉina restoracio. Trankviletosa gustumado de ekzotikaj pladoj finis nian ĉi-fojan Solstican feston.



Solsticaj festemuloj fotitaj en restoracio Szechuan.

Italio kaj junuloj – IJF logas

Ĉu vi volas uzi Esperanton en praktiko? Ĉu vi volas vojaĝi al Italio? Ĉu vi estas membro de FEJO aŭ sub 30-jarulo?

Ankaŭ ĉi-jare FEJO planas sendi du junulojn al Internacia Junulara Festivalo (IJF) en Italio. Por kovri la vojaĝ- kaj partoprenkostojn de la partoprenontoj, FEJO esperas ricevi subvenciojn de diversaj instancoj (i. a. eduk- kaj kulturministerio). IJF estas ĉiujara internacia junulara esperantoaranĝo okazanta dum pasko kaj organizata de la itala esperantojunularo. IJF 2012 okazos en Cervia, proksime al Rimini kaj Bologna. Ĉe <http://iej.esperanto.it/ijf/2012/index.eo.php> troviĝas la detalaj informoj pri la aranĝo.

Se vi interesigas pri (preskaŭ) senpaga partopreno en IJF, estas sub 30-jarulo kaj parolas Esperanton almenaŭ kontentige, kontaktu *Paula Niinikorpi@gmail.com* ĝis la 29-a de februaro 2012.

★

Haluatko päästä kokeilemaan esperanton taitojasi käytännössä? Haluatko matkustaa Italiaan? Oletko FEJOn jäsen tai alle 30-vuotias?

FEJO aikoo lähettää myös tänä vuonna kaksi

Hyvä lernu!n käyttäjä!

Tervetuloa keskustelemaan uudella suomenkielisellä foorumilla (<http://fi.lernu.net/komunikadoforumo>). Se on tarkoitettu kaikille esperantosta kiinnostuneille, joten sinne voivat tulla niin aloittelijat kuin kokeneet käyttäjät. Kirjoittajat voivat kysyä, kommentoida ja vastailta eri viestiketjuissa lukijoiden avaamista aiheista. Foorumi on nopein väline viestimiseen, joten sitä kannattaa ryhtyä käyttämään aktiivisesti. Siellä tutustuu nopeasti muihin käyttäjiin.

Tavataan foorumilla t. Teuvo



nuorta esperanton harrastajaa Italiaan Internacia Junulara Festivalo -tapahtumaan eri tahoilta saamallaan avustuksella.

Internacia Junulara Festivalo (IJF) on Italian esperantonuorten joka vuosi järjestämä kansainvälinen nuorten esperantotapahtuma, joka tänä vuonnakin pidetään pääsiäisen aikaan (4.4.–10.4.2012). Tällä kertaa tapahtumapaikana on Cervian kunta Bolognan ja Riminiin lähellä. Sivuilta <http://iej.esperanto.it/ijf/2012/index.eo.php> löytyy tarkemmat tiedot tapahtumasta.

Jos siis olet kiinnostunut (lähes) ilmaisesta matkasta Italiaan IJF:hon ensi pääsiäisenä, olet myös alle 30-vuotias ja puhut ainakin tyydyttävästi esperantoa, ota yhteyttä. Lisätietoja ja vapaamuotoiset hakemukset osoitteeseen *Paula Niinikorpi@gmail.com* 29.2.2012 mennessä.

Paula Niinikorpi

Antaŭen informas

Antaŭen havis siajn elekto- kaj estrarkunvenoĵin la 21an de novembro. Ni interŝanĝis niajn taskojn por 2012 sekve:

Jukka Laaksonen – prezidanto

Sylvia Hämäläinen – vicprezidanto kaj prizorganto de la libraro

Tapani Aarne – sekretario-kasisto

Veli Hämäläinen – mastro de Nesto

Lauri Liukkonen – estrarano

vicestraranoj: Terhi Laaksonen, Marjatta

Ström, Markus Sunela kaj Pentti Järvinen

*Informis Sylvia Hämäläinen,
ankoraŭ nun sekretario*

Jörg Borgerding: La dripendelisto

Kiam mi ankoraŭ estis eta knabo, kaj ĉiuj miaj ludkamaradoj revis fariĝi lokomotivestro, astronauto aŭ generalo, al mi jam estis tute klare, kiun profesion mi iam poste praktikos: tiun de dripendelisto.

Mi estas dripendelisto.

Same kiel mia patro, kaj lia patro antaŭe. Mia avo ne nur estis la unua dripendelisto en nia familio, li entute estis la unua homo, kiu praktikis tiun metion. Estis hazardo, kiu faris mian avon dripendelisto. Tiel, kiel ofte en la vivo estas la koincidoj, kiuj devigas gravajn direktoŝanĝojn de la homaj vivovojoj.

Difekto en la turnila mekaniko de la buterbarelo de mia praaavino estigis la komencon de la dripendelado. Praavinjo jam estis aĉetonta novan buterbarelon, ĉar la malnova ja dum pli ol dudek jaroj plenumis kontentigan servon. "Atendu", eble mia avo retenis sian patrinon, inspektante la permane pelendan kirlomekanikon de la barelo. Estis eta peranta mufo, kiu pro malsufiĉa flegado kaj tro malmulte da oleo ŝoviĝis el la tiucele provizita ejo. Tiom komplika kaj preskaŭ tute neatingebla estis la pozicio, kien la mufo sin metis, ke per kutimaj iloj riparado estintus sen perspektivoj. Mia avo, junulo tiam 15-, eble 16-jaraĝa, tamen sprita kaj genia, malaperis por kelkaj horoj en la riparejo de sia patro. Oni aŭdis lin marteli kaj fajli, segi kaj blasfemi. Je la frua vespero de tiu por sia – kaj ankaŭ mia vivovojo tiel decida tago, li subite kaj eble vokante: "Fine!" kuris el la ŝedo, iris en la malvarmetan kuirejon, en kiu staris la buterbarelo, tenante en la manoj strange aspektan aparaton, el kunplektitaj dikaj dratoj, el kiuj kelkaj estis moveblaj horizontale, aliaj vertikale.

Li ĉirkaŭis la misiĝintan mufon de la praaavino buterbarelo per unu el tiuj maŝoj, decideme tiris je flanke elstaranta drata kranko, por poste bati

per mallonga, forta frapo de la dekstra mano sur metalstangon provizitan per lignoglobo. Seka "plop" kvitancis la sukceson de lia agado. La mufo denove troviĝis je la por ĝi destinita loko, kaj la buterbarelo plue plenumis bonajn servojn dum multaj jaroj.

En la kamparo ekzistis diversa kamparana ilaro, kies fajnaj mekanikoj ofte suferis pro la krudaj laboroj, por kiuj ili estis uzitaj. Plej ofte la bravaj kamparanoj duonkore provis mem ripari tiujn difektojn, sed tio ofte malsukcesis pro manko de tempo aŭ talento. Tiam ili lasis la aparaton ie en la korto, en la ŝedo aŭ je iu fora loketo de ilia bieno kaj fordonis ĝin al detruigo. Kiam najbaro de miaj pragepatroj, unu el la ĵus menciitaj kamparuloj, aŭdis pri la mekanika glorigado de mia avo, li petis, ke la junulo bonvole pritraktu lian terfosadilon, kies trudlomekaniko dum la lasta vintrotrudlado difektiĝis per granda ŝtono, kiu troviĝis sub la tersurfaco. "Ĉio en postaĵo", laŭdire la kamparano diris al mia avo, kiam tiu inspektis la damaĝon.

"Nenio estas nebla", sekve laŭdiris mia avo, por denove malaperi plurajn horojn en la ŝedo de sia patro. Alia, pli fajna kaj pli komplika dripendelilo estis necesa por ĝuste redeli la disdelitajn dentradojn de la trudlomekaniko. Sekvintage mia avĉjo aperis kun pluevoluajo de sia antaŭ nelonge verkita prototipo de la dripendelilo sur la korto de nia najbaro. Apenaŭ horon poste la feliĉega kamparano povis daŭrigi la tiel abrupte interrompitan vintrotrudladon: per sia malnova terfosadilo!

Tiel estis la komencoj de la dripendelado kaj la ekesto de la samnoma metio. Baldaŭ superŝutita per taskoj, mia avo forigis siajn unuajn profesiajn planojn – aktoro li komence intencis fariĝi – el la kapo. Post la abiturienta ekzameno li malfermis sian dripendeladejon. Komence de la 50aj jaroj, mia avo havis bonegan reputacion

ĉilande, kaj estis ankaŭ jam pli ofte vokita en la apudajn alplandojn, li pensiuliĝis kaj transdonis la entreprenon al mia patro, al kiu li dum multaj jaroj de kuna laborado estis instruinta ĉiujn turnojn, trukojn kaj sekretojn de la dripendelado.

Mia patro uzis multajn de la diversaj dripendeliloj, kiuj estis evoluigitaj de avĉjo, sed ankaŭ kreis ĉiam denove novajn special-dripendelilojn, aparte adaptitajn por la specialaj bezonoj.

Kiam mi ankoraŭ estis eta knabo, kaj miaj ludkamaradoj revis fariĝi lokomotivestro, astronauto aŭ generalo, al mi jam estis tute klare, kiun profesion mi iam poste praktikos: tiun de dripendelisto.

Tiel ankaŭ okazis. Hodiaŭ mi gvidas la entreprenon, mia patro de tempo al tempo helpas min ĉe taskoj, por kiuj estas bezonataj scioj pri malnovaj, jam delonge ne plu produktitaj mekanikaj iloj. Delonge komputiloj envenis la dripendeladon. Ekzemple mia ĝis nun plej interesa, ĉar plej komplika tasko ne estintus solvebla sen memevoluita dripendel-softvaro: La milenioskuilo, urĝa kaj datoligita mendolaboro de grava germana industrientrepreno al la Fraunhofer-instituto en Munkeno, mallonge post la unua provokuro montris fortajn interkonperlentojn en la printempo-interfaco. La forigo de tiuj neregulecoj, kiuj kaŭzintus rimarkendan damaĝon al la bona reputacio de la instituto, okupis min dum pluraj tagoj kaj noktoj, preskaŭ sen dormo. Tiam estis atingite: la milenioskuilo funkciis sen perturboj.



La aŭtoro naskiĝis 1957, vivas en nordgermana Celle kaj skribas ekde 1999 rakontojn, satirojn kaj poemojn. 2000 li ricevis la Wilhelm-Busch-premion de la urbo Stadthagen pro satira versfarado.

Same kiel mia patro kaj mia avo, mi entreprenas mian metion sola. Neniuj dungitoj.


Mi ne akceptas pli da taskoj ol mi povas plenumi dum superrigardebla tempo. Krome mi ne eluzas mian scion pri la dripendelado por gajni nedecan profiton. Riĉa la dripendelado faris nek mian avon, nek mian patron, nek ankaŭ min.

Sed feliĉa!

Domaĝe miaj filoj ne interesiĝas pri dripendelado. Tridekkvinhora semajno, jarfina bonuso kaj firmaa pensio al ili signifas pli ol la ĝojo pro nia familia metio. Sekve nia plejaĝulo gajnas sian monon kiel profesia feriiisto ĉe variaj deĵorlokoj, dum la etulo volas fari profesion de sia sporta talento: Li deziras fariĝi profesia ŝvurblo-ludisto, poste eble malfermi ŝvurblo-lernejon. Mi ne plendas kontraŭ miaj filoj. Tiel la dripendelado suferos la samon kiel jam multaj aliaj metiprofesioj pasintece, ekzemple la ĉizilforĝado, la kombilrabotado aŭ la argiloglazurado, por nur nomi tiujn.

Kune kun mi la nobla metio de la dripendelado mortos.

[el: lesebuch.net, traduko: RB]



Esperanton maailmanliiton jäsenmaksut 2012

MG 10,00 (opaskirja, kuukausittainen verkkotiedote) MJ 25,00 (vuosikirja, Esperanto verkko-lehtenä) MA 61,00 (vuosikirja, Esperanto) Alle 30-vuotias MJ ja MA: myös TEJO:n jäsenyys ja Kontakto (s. 1.1.1982 jälkeen)

DM 1525,00 (ainaisjäsen, 25 x MA, vuosikirja ja Esperanto) DMJ 625,00 (ainaisjäsen, 25 x MJ, vuosikirja) DPat 15 250,00 (ainaistukijäsen, 250 x MA, vuosikirja ja Esperanto, Societo Zamenhof -jäsenyys)

TUKIMAKSUJA: Patrono de TEJO 75,00 (3 x MJ-jäsenmaksu, Kontakto ja TEJO:n julkaisut) Dumviva Patrono de TEJO 1875,00 (25 x PT-tukimaksu, Kontakto ja TEJO:n julkaisut)

Societo Zamenhof 122,00 (vähintään 2 x MA-jäsenmaksu)

LEHTIÄ: Esperanto (UEA) 38,00 Kontakto (TEJO) 23,00 La Espero (Svedio) 22,00 Monato 50,00 (lentopostitse 54,00) Monato elektronisena 30,00 La Ondo de Esperanto 38,00 (lentopostitse 43 euroa) La Ondo de Esperanto elektronisena (pdf) 12,00

Maksut tilille: FI66 8000 2005 9953 69

Tiedustelut ja ilmoitukset: Päivi Saarinen (ĉefdelegito) Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo puh. (09) 813 3217 tai 050 490 0154 s-posti: eafoficejo@esperanto.fi

Kien iri eksterlande en la nova jaro?

25.2.–3.3. St Raphaël (FR): Mediteranea Esperanta Semajno 2012 kun diversnivelaĵoj kursoj. ☐ <http://j.mp/vYlQTV>

25.–28.5. Berlin (DE): Komuna Germana-Pola-Dana Kongreso. ☐ <http://j.mp/tv5W4v>

28.4. Rotterdam (NL): 36-a Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA (50-jaroj en Nieuwe Binnenweg). ☐ uea.org

29.4.–9.5. Jalta (UA): 24-a Aroma Jalto. ☐ <http://aromajalto.ukrainio.org.ua/>

5.–8.7. Pala, EE: 48-a BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj). ☐ EAE

16.–20.7. Galway (IE): 9-a EEU-Kongreso. ☐ <http://eeu-kongreso.webnode.com/>

21.–29.7. Nitra (SK): 5-a SES (Somera Esperanto-Studado), renkontiĝo de lernu!-anoj. ☐ <http://j.mp/s6724x>

Sveda Esperanto-Federacio invitas al tutlanda kongreso en la sudsveda urbo Helsingborg la 18-an ĝis la 20-an de majo 2012. La programo enhavas ekskursojn, interesajn prelegojn, muzikajn distraĵojn, krom jarkunvenojn de kelkaj el la svedaj esperanto-organizaĵoj.

Aliĝu aŭ/kaj petu pliajn informojn ĉe sefkongr@esperanto.se aŭ telefone ĉe Ann-Louise Åkerlund +46 (0)736-170 123 aŭ Dan Palm +46 (0)701-709 460. Paperpoŝta adreso: Ann-Louise Åkerlund, Ättekullagatan 16, SE-25361 Helsingborg, Svedio.

*Ann-Louise Åkerlund
estrarano de SEF*

Lingva politiko kaj lingva konscio

En la nuntempa plejparte anglalingva mondo la naciaj lingvoj estas plurmaniere minacataj. La kaŭzo ne estas nur propagando de la anglalingvaj landoj, sed ĉefe neglekto de nacilingvanoj mem, kaj sciencistoj kaj ordinaruloj. Pli science oni povas paroli pri manko de lingva konscio.

Speciale dum rego de Ruslando lingva konscio estis ege forta en Finnlando. Post la dua mondmilito la finna lingvo jam estis memklara afero, ne plu bezonanta specialan protekton. Sed kio okazis dum la nuna jarmilo? Preskaŭ nerimarkite la angla lingvo flankenpuŝis nian nacian lingvon, plej forte en la kampoj de natursciencoj, tekniko kaj ekonomio. Estas mode publiki sciencajn esplorojn kaj disertaciojn nur en la angla lingvo kaj eĉ aranĝi sciencan edukon ekz. por kuracistoj per la ”internacia lingvo”.

Kiam la finnaj sciencistoj kaj fakuloj pensas kaj interparolas pri siaj esploroj per fremda lingvo, iom post iom ili rimarkas, ke ili ne plu kapablas esprimi sin per la nacia lingvo. Tio signifas, ke dezirante rakonti al vasta publiko pri siaj eltrovaĵoj, ili ne plu trovas esprimojn kaj komencas uzi fremdlingvajn esprimojn. Tio kaŭzas, ke ordinaraj homoj ne povas plene kompreni pri kio temas. El politika vidpunkto estas ege grave, ke ordinaraj homoj povu ankaŭ partopreni al diskutoj ekz. pri ŝanĝiĝo de klimato, pri financa politiko de Eŭropa Unio, pri zorgo de gemaljunuloj k.t.p. Sed kiumaniere diskuti, se mankas nacilingva terminaro?

Ridinda, eĉ plorinda ekzemplo pri sciencista blindeco okazis antaŭ iom da tempo en Universitata Hospitalo de Tampere. Oni fondis tie tute novan sekcion, kiu celis kuraci kaj prizorgi pacientojn suferantajn pri diversaj akutaj perturboj de cerba sangocirkulado. Kuracistoj ne

trovis konvenan finnan nomon por la sekcio kaj sekve ili nomis ĝin ”stroke unit”. Tio kompreneble kaŭzis multajn miskomprenojn inter pacientoj kaj iliaj familianoj. Oni faris oficialajn plendojn pri la nomo kaj finfine laŭ la decido de parlamenta jura komisaro oni devis ŝanĝi la nomon. Nun la sekcio nomiĝas ”aivoverenkier-tohäiriöyksikkö”. La nomo estas iomete longa, sed tute klara por nacilingvanoj.

La kaŭzo por la rego de la angla lingvo inter sciencistoj estas plejparte manko de efika lingva politiko kaj lingva konscio. Oni ne komprenas signifon de finna lingvo al kulturo kaj al la ekzisto de la nacio. Sen evoluo de nacia lingvo malfaciliĝas evoluo de kulturo kaj iom post iom estos minacata ankaŭ la ekzisto de la nacio. Por preventi tian evoluon estas ege grave, ke la politikistoj kaj antaŭ ĉio la sciencistoj komprenu, ke ne sufiĉas nur scienca esprimo. Pli grave estas populara esprimo. Sekve la sciencistoj devas esti plejparte edukitaj per sia propra nacia lingvo kaj ili devas publiki rezultojn de siaj laboroj ankaŭ per la nacia lingvo. Kiam ordinaraj homoj rimarkas, ke sciencistoj uzas fremdajn terminojn, ili devas tuj rimarkigi, ke ili ne komprenas kaj postuli nacilingvan esprimon.

Ni esperantistoj posedas bonan lingvan konscion, sed ĉu ni memoras kaj kuraĝas esprimi tion? Laŭ mia opinio ni eĉ ne bezonas reklami Esperanton por sciencistoj. Sufiĉas, ke ni simple ne akceptas anglalingvajn terminojn por ĉiutaga uzo. Tio povas vekti lingvan konscion de sciencistoj kaj malfermi pordon al interesiĝo pri Esperanto.

Arja Kuhanen

Yrjö Hiltunen
23.4.1917–
1.1.2012

Kirsti Hiltunen
14.8.1920–
30.11.2011



Naskita en Kouvola, tiama Valkeala, Yrjö Hiltunen tie loĝis la tutan vivon kaj laboris kiel fervojisto. Sen multa lerneja studado, li memlernis lingvojn kaj trovis Esperanton, fascinanan pro klareco, logikeco.

La internacia lingvo internaciigis lian vivon kaj havigis reton de kontaktoj tra la mondo, amikojn kaj vizitojn ĝis Ĉinio, Mongolio, Norda kaj Suda Ameriko. Lia lasta kongreso estis la fervojista en 1998 en Danlando – li estis la dojeno en tiu kongreso, 81-jara. Lia edzino Kirsti ofte kunestis; fakte la geedzoj sin trovis en Esperantokurso. Li ankaŭ instruis Esperanton dum du jaroj en civitana instituto. Yrjö estis membro de EAF kaj IFEF kaj dumviva membro de UEA, fakdelegito.

Yrjö kaj Kirsti Hiltunen geedziĝis en 1952 kaj havas tri gefilojn, Anja, Eero kaj Ulla-Maija. Filino Anja rememoras, ke la gepatroj ne povis kaj ankaŭ evidente ne volis reteni la lingvon ”sekreta”, ankaŭ la gefiloj ĝin iom lernis.

Pasiaj hobiaj, Esperanto kaj ŝako, helpis Yrjö reteni sin vigla ĝis sia alta aĝo. Vortaj ludoj kiel palindromoj lin fascinis. En la lastaj jaroj Kirsti pro la malfortiĝinta sanstato ne plu povis loĝi hejme, kion Yrjö trovis la granda ĉagreno de la vivo. Sed estis ankaŭ granda ĝojo, la genepoj.

*Anja Hiltunen,
 Tuomo Grundström*

Muut lehdet

Suomalaiset Kööpenhaminan juhlissa

Hyvinkäällä ja Riihimäellä ilmestyyvä Aamuposti kirjoitti 5.11.2011 suomalaisten esperantistien osallistumisesta Kööpenhaminan maailmankonferenssiin. Suomalaisten joukossa oli myös hyvinkääläisiä esperantisteja. Hyvinkään esperantistit Raita Pyhälä ja Sirkka Mattlin osallistuivat Kööpenhaminan kaupunginjohdajan vastaanotolle, joka oli järjestetty konferenssin vuoksi. Tilaisuudessa ei tarvittu tulkkia muuten kuin kaupungin edustajan puhetta varten. Muuten vanhan kaupungintalon juhlasalissa pärjättiin esperantolla. Viikon mittaisen kongressin teemana oli kulttuurien lähentyminen. Ohjelmassa oli konsertteja, teatteria, luentoja ja esperanton opetusta, kertoi Aamuposti. Aamupostin jutun kuvassa poseerasivat Sirkka Mattlin, ranskalainen laulaja JoMo ja Raita Pyhälä Kööpenhaminan vanhalla kaupungintalolla.

Jukka Noponen

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. [☎ 0500 813 530](tel:0500813530) [✉ onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. [☎ 040 867 2743](tel:0408672743) www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. <http://esperantoulu.info/> [✉ aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla [✉ matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaletto@kolumbus.fi [☎ 050 5829 248](tel:0505829248))
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. [✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. [✉ sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi) [☎ 050 321 4313](tel:0503214313). Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. [☎ \(09\) 660 651](tel:09660651) [✉ steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [✉ fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoi-

tavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on aktiivinen esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu säännöllisesti. Ryhmän yhteystiedot: (Marti Pennanen) Esperantoklubo de Lahti, Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. [✉ martti.pennanen@phnet.fi](mailto:marti.pennanen@phnet.fi)

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. [✉ irja.miettinen@pp1.inet.fi](mailto:irja.miettinen@pp1.inet.fi), jormato35@gmail.com

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2012**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
2/2012	1.3.	15.3.	en aprilo
3/2012	1.5.	15.5.	en junio
4/2012	1.7.	15.7.	en aŭgusto
5/2012	1.11.	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anoncprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Pakkoesperantoa

Hämeenlinnan paikallisradio kertoi, että illalla kello 18.00 on kirjastolla kansainvälinen kielikahvila. Tarjolla on kahdeksaa eri kieltä. Kielet lueteltiin; ei esperantoa.

Kun puffi asiasta oli myös lehdessä, marsin kirjastolle ja lupasin esitellä esperantoa. Olivat asiasta kovin iloisia. Minulle luvattiin pöytä, jossa olisi esperantokirjoja ja lappu: ESPERANTO.

Ilta alkoi lupaavasti. Kaksi naista otti minut jo aulassa käsittelyynsä ja monisanaisesti antoivat ymmärtää, että kuinka hienoa oli, että pääsin paikalle. Veivätten heti kahville. Olin imarreltu ja hämmästynyt.

Siinä kahvitellessa paikalle saapui myös muitten kielten edustajia ja puheensorina oli kuin Baabelin tornissa. Havahduin kun minulta kysyttiin palkkiotani ja puhuttiin auditoriosta.

Samalla tilanne selvisi; kirjailija Tuomas Kyrö saapui pöytäamme. Hänen kuvansa oli-

kin ollut kirjaston ovelta. Samanlainen parita, hiukan lyhyempi vain. Tuomaksella alkoi oma luentonsa samaan aikaan kuin Kielikahvila!

Kyllä minä niin mieleni pahoitin, kun minua Kyröksi luultiin. Asia sai makeat naurut ja koko Babylonia hajaantui ainakin 12 pöytään ja pulina alkoi.

Esperantisteja ei tullut ja pöytäni tuli somaleita ja ulkomaalaisille suomea opettava viehättävä naisihminen. Pari vuotta Suomessa olleet somalit puhuivat hiukan suomea ja kyselivät, että mikä se esperanto on?

Niinpä iltani painopiste oli kertoa esperanton perusteita somalipakolaisille.

Asiassa oli useita hyviä puolia. Seuraavalla kerralla meitä mainostetaan joka mediassa ja meille tarjottiin kokoontumispaikkaa Kulttuurikeskuksen ”Kutomon” tiloista. Ilmaiseksi.

Markku Sarastamo

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Jutut 15.3.2012 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2012 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini, Tampere 2012